

Membriĝu en ATEO!

Membroj de ATEO ricevas du numerojn de la revuo jare, kaj samtempe subtenas ĝian agadon.

Jarkotizo de ATEO:

10 eŭroj jare por A-landoj *

8 eŭroj jare por B-landoj **

Pagu al la konto **ateo-y** ĉe UEA.

Eblas pagi ankaŭ per kreditkarto. Por pli da informoj kontaktu la sekretarion ĉe:

anna.lowenstein@esperanto.org.

** B-landoj: la iamaj socialismaj landoj de Eŭropo, ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanujo kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latina Ameriko.


* A-landoj: ĉiuj aliaj.

Celoj de ATEO

- Kunligi esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.
- Disvastigi Esperanton inter ateistoj.
- Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
- Instigi ĉe Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
- Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem, kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.
- Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.

Ĉu vi opinias ke...

- **Scienco, ne religio**, estas la plej bona maniero por malkovri kaj kompreni la mondon?
- Moralaj valoroj devus esti bazitaj sur **racio kaj respekto por aliaj homoj**?
- Ni povas trovi **signifon, belecon kaj ĝojon en la unusola vivo kiun ni havas**, sen bezono kredi je posta vivo?
- Zorgante pri aliaj homoj, ni povos **krei pli bonan mondon por ĉiuj**?



**Ateista Tutmonda
Esperanto-Organizo**

kunlaboranta asocio de UEA

Agadoj de ATEO

Agado interne de la Esperanto-movado

La publika kunveno dum la Universala Kongreso estas grava okazo, kiam eblas prezenti ateismon al la kongresanaro kaj ankaŭ varbi membrojn por ATEO. Por multaj homoj, tio estas malofta okazo por publike anonci sian ateismon kaj dividi siajn opiniojn kun sammensanoj.

Ekstera agado

La vicprezidanto de ATEO, Dominique Simeone, reprezentis nian asocion ĉe la fondkunveno de la Internacio de Liberpensulo en aŭgusto 2011. Pluraj esperantistoj ĉeestis tiun kunvenon en Oslo, Norvegujo, kaj certigis, ke ĉiuj interesatoj aŭdu pri la internacia lingvo. Esperantisto ankaŭ eniris la estraron de tiu asocio. Ankaŭ en ĝia retpaĝaro estas sekcio en Esperanto ĉe: <http://www.internationalfreethought.org/snip/spip.php?rubrique11>.

Kio estas ateisto?

Ateisto estas homo, kiu ne kredas je la ekzisto de Dio aŭ dioj. La plejmulto da ateistoj ankaŭ ne kredas je la ekzisto de animo aŭ de postmorta vivo.

Multaj homoj anstataŭ nomi sin **ateisto** preferas uzi la terminojn **agnostikulo**, **liberpensulo**, **humanisto**, **sekularisto**, **raciisto**, **skeptikulo** aŭ **nereligiulo**. La preferata termino emas varii inter landoj kaj kulturoj.


Agnostikulo estas homo, kiu ne scias, ĉu ekzistas Dio aŭ dioj. En la praktiko, tio kutime signifas, ke li/ŝi organizas sian vivon senrilate al dio aŭ religiaj kredoj.

Liberpensulo estas homo, kiu malakceptas aŭtoritatan kaj tradicion en ĉiuj opinioj kaj kredoj, inkluzive de religiaj kredoj.

Humanisto (en la moderna senco) estas homo, kiu celas vivi bone kaj morale senrilate al religio, provante plibonigi la vivon por ĉiuj.

Sekularisto opinias, ke ŝtataj instancoj kaj leĝaroj ne devas esti influataj de religiaj gvidantoj kaj religiaj kredoj.

NE GRAVAS, ĈU VI KONSIDERAS VIN ATEISTO, AGNOSTIKULO, LIBERPENSULO, HUMANISTO AŬ ALIA: VI SAME ESTAS BONVENA EN ATEO!



La revuo *Ateismo* aperas du fojojn jare. Ĝi enhavas artikolojn, leterojn, diskutojn kaj ateismajn novaĵojn. Ĉiuj membroj de ATEO ricevas la revuon papere aŭ rete laŭdezire. Temoj traktitaj en la lastaj numeroj:

Ĉu ateistoj estas kontraŭ religio? Mitoj kaj veroj pri ateismo. Provoj forigi la krucifikson el ŝtataj lernejoj.

Kio estas la celo de la vivo? – laŭ ateistoj.

Racio kaj la ekesto de la universo. Eklezio kontraŭ demokratio en Pollando.

Ateismo en Japanujo.

Trudo de religio en la publikan vivon.

Ateisma moralo.

Ĉu libera merkato por kredoj?

Malnovaj numeroj de nia bulteno estas legeblaj ĉe:

<http://www.gazetoteko.com/ateo/>